# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

**Organo de FRANCA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ, filio de IKUE**

==================== LA HOUSSAYE-en-BRIE (Seine-et-Marne) FRANCE ===

==========================================================================

Sekretario : S-ro Jean BARRIER, 89, rue Roger Salengro, DRANCY -93-
Kasistino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux, LES ANDELYS -27-

C.C.P.- Ligue Française Catholique Espérantiste, - ROUEN - 2 324 93 K.-

--- Abono : 3 Fr-- + Kotizo : 1 Fr-- = Sume = 4 Fr--

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

Redaktorino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux,- LES ANDELYS -27-

Sendu la materialon por la bulteno antaŭ la 1-a de Januaro, la 1-a de Aprilo, la 1-a de Julio, la 1-a de Oktobro.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

**** N° 85 *** BULLETIN TRIMESTRIEL *** TRIMONATA BULTENO **********

Sankta PIO X-a, preĝu por ni.

§§§-- Julio 1970 --§§§

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## E N H A V O.

| Paĝoj | | |
|---|---|---|
| " | 2 | Bileto de la religia konsilanto |
| " | 2 & 3 | Nia Espero |
| " | 3 | Eklezio respektegas la Sanktan Skribaĵon |
| " | 3-4-5 | Protokolo de la komitatkunveno |
| " | 5 | Lingva angulo |
| " | 6 | Enketo |
| " | 6 | Informoj |
| " | 5 | Nia membraro |
| " | 7 | Kotiztabelo |
| " | 6 & 7 | Varbante samideanojn |

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

La komitatkunveno okazos la 27-an de septembro ĉe Chabrol, je la 15-a horo. Ĉiu ligano povas ĉeesti.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## R E N K O N T I Ĝ O

Ferioj ! Tempo de ripozo, tempo de malstreĉiĝo, tempo de renkontiĝo ankaŭ ! Eble niaj somerferioj estos plejparte okazo renkonti familianojn, amikojn, nekonatulojn ... Eble ni partoprenos kongreson aŭ kunvenon ...

Ĉiukaze aliuloj venos al ni. Kia estos nia sinteno kiel homo kaj kristano ilirilate ?

Dion oni ne devas interkrampigi en tiu ĉi libertempo. Se mi vere kredas, Li ĝuste venas renkonte al mi en tiu ĉi viro, en tiu virino. La trudiĝemulo, kiu ĝenas mian ripoztempon, estas Li ! L'amiko, kiu vojiras kun mi, estas Li ! La solulo, apud kiu mi iras kaj kiun mi ne atentas, estas Li ! Tiu, kiu ne samopinias kaj, sekve, kun kiu mi disputas, aŭ kiun mi malestimas estas ankaŭ Li ... !

Do faru ni, ke tiu tempo de la renkontiĝo kun aliuloj estu la tempo de la renkontiĝo kun Kristo. Por tio, ni revigligu nian Kredon. La rigardon de Kristo ni retrovu, porrvidi Dion en niaj proksimuloj. Por tio, ni revigligu nian Karitaton, por ilin ami kun la koro de Kristo.

Tiam niaj ferioj ne estos vakaj, sed plenaj je homa kaj dia ĉeesto.

D-ro G. BAUDRY

!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!

## N I A   E S P E R O

..." ĉu Vi tute forpuŝis Jehudan ? ĉu Via animo eksentis abomenon kontraŭ cion ? kial Vi frapis nin tiel, ke neniu povas nin resanigi ? ni esperis pacon, sed venis nenio bona; ni esperis tempon de resaniĝo, sed ni havas nur teruron. Ni konfesas, ho Eternulo, nian malpiecon kaj la malbonagojn de niaj patroj; ĉar ni pekis antaŭ Vi. Pro Via nomo ne melestimegu nin, ne malaltigu la tronon de Via gloro; memoru kaj ne rompu Vian [illegible] interligon kun ni. Ĉu inter la idoloj de la nacioj ekzistas tiaj, kiuj povas doni pluvon ? ĉu la ĉielo per si mem donas pluvegon ? Vi estas ja la Eternulo, nia Dio, kaj ni esperas al Vi, ĉar Vi faras ĉion ĉi tion." (el Jeremia : 14- 19/22-)

====================================================================

Ni meditu : Ne, ni finfine ne estas forĵetitaj, ĉar Dio havas nenian abomenon kontraŭ ni pro nia peko. Li memoras pri sia alianco. Li ne ĉesas ĉeesti apud ni, eĉ dum la afliktempo, eĉ dum la terurtempo. Sinjoro, helpu nin, por ke ni rekonu la multnombrajn signojn de via ĉeesto. Kaj mi diros, plena je fido : "Ho nia Dio, en vi esperas, ĉar ĉion ĉi faris vi".

wwwwwwwwwwww xxxxxxxxxxxxxxxxx wwwwwwwww

EKLEZIO RESPEKTEGAS LA SANKTAN SKRIBAĴON
=========================================

La Eklezio ĉiam respektegis la Sanktan Skribaĵon, kiel ĝi respektegas la Korpon de l'Sinjoro mem. En la Sankta Liturgio precipe ĝi ne ĉesas ekpreni la vivopanon sur la tablo de la Dia Parolo kaj de la Krista Korpo por proponi ĝin al la fideluloj.

Ĉiam ĝi sekvis kaj sekvas, kiel superan regulon sia fido, la Sanktan Skribaĵon kune kun la Sankta Tradicio. Ĉar, inspiritaj de Dio kaj definitive registritaj skribe, ili komunikas sen ŝanĝo la Dian Parolon mem kaj aŭdigas en la diroj de la profetoj kaj apostoloj la voĉon de la Sankta Spirito.

La tutan eklezian predikon, kiel la kristanan religion mem, devas nutri la Sankta Skribaĵo.

En la Sanktaj Libroj la ĉiela Patro korinklinas al ni kaj venas al siaj filoj por interparoladi kun ili. La forto kaj povo de la Dia parolo estas tia, kia ĝi liveras nutraĵon kaj fortikecon al la Eklezio kaj alportas al la ekleziaj filoj firmecon por ilia animo, puran kaj neelĉerpeblan fonton por ilia spirita vivo.

(Koncila konstitucio pri Dia Revelacio, N° 21-)

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

KOMITATKUNVENO DE LA 7-a DE JUNIO EN PARIS.

$$$$$$$$$$$$$$$

La Prezidanto malfermas ĝin je la 15.15; ĉeestas 5 anoj.

Senkulpigitaj : F-inoj Le Boëdec kaj Paulier, S-roj Bessière, Ligot, Ribot kaj Véron.

.../...

.../...

1°/- Impresoj pri la kongreso en La Houssaye

Konsidere al la aĉa vetero, ĝi estas sukceso; la urbestro de La Houssaye estas tre kontenta de sia vizito.

La kongreso estas anoncita en "Le Pays Briard" kaj "Le Parisien Libéré".

Laùeble, fotoj aperos en la oktobra numero de nia bulteno.

post la kongreso, artikolo aperis en "Zenith", gazeto redaktita de la liceanoj en Neufmoutiers.

II.- Venontjara kongreso.

LKK jam vigle laboras por ĝin prepari en Orléans. Estus dezirinde trovi ejon, kie ĉio povus okazi : kunvenoj, manĝoj, diservo, laĝado. La kongreso okazos la 28-an de marto kun ĝenerala kunveno matene kaj ekskurse posttagmeze.

.III.- Elekto de nia reprezentanto en Klagenfurt.

Letere estas sendita al S-roj Colleu kaj Chapellier, kiuj anoncis sian intencon vojaĝi al Klagenfurt por peti ilian konsenton. Unu el ili ricevos mandaton transdoni al IKUE la

IV;- Raporto pri nia agado

Depost la kongreso en Limburg, nia membronombre kreskis al 140. Regule kvarfoje en la jaro kunvenis nia komitato kaj aperis nia "Franca Katolika Esperantisto".

En 1969, la Ligo eldonis novan informilon kaj aranĝis katolikan diservon dum la franca-germana kongreso en Strasbourg kun la partopreno de S-to Wannamakers el Nederlando.

ĉijare okazis kongreso de la Ligo en La Houssaye-en-Brie apud Paris kun kontentiga partopreno de la liganoj spite al la aĉa vetero. Oni elektis honormembrojn : F-ino Le Böëdec, F-to Marmou, S-to Ouarnier.

Kiel kandidatoj al la plenumkomitata de IKUE sin prezentas S-roj Bessière kaj Colleu.

V.- Julia bulteno.

Sendi la materialon al F-to Marmou fine de Junio.

Oni petos la anojn verki originalajn artikolojn.

Oni reklamos por la koresponda kurso kaj la jubulkotizo.

.../...

.../...

Estus dezirinde, ke ĉiujare aperu la listo de la estraranoj.

VI.- Nia somera agado.

Somere estas la plej bona momento por agi, ĉar ni estas liberaj. Ni kontaktu la katolikojn, kiujn ni konas kaj parolu al ili pri Esperanto.

VII.- Diversaĵoj.

Letere de S-ro Bessière pri la plenumkomitato de IKUE. La franca Ligo rajtas havi 2 komitatanojn.

La kunveno finiĝid je la 17-a per komuna "Patro Nia".

§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§

## L I N G V A   A N G U L O

1°/- Ne savoir où donner la tête;

2°/- Etre matinal.

Pro la multaj proponoj ricevitaj, ni indikas nur la esprimojn, kiuj aspektas plej taŭgaj :

Ne scii, kien sin turni (S-roj Dauchez kaj Motillon);

Tute ne scii, kio estas unue farota (S-ro J.M. Guillon)

Esti Frumatenema (S-ro Dauchez)

Laŭ "Larousse Universel", "être matinal" signifas, kiu frue elllitiĝis, sed nur okaze. Oni ne povas traduki per "kutime frue leviĝi". Se temas pri kutimo, la franca esprimo estas "être matineux", kiu korespondas al la lasta traduko, proponita de S-roj J.M. Guillon kaj Despiney.

Por la Oktobra bulteno, bonvolu traduki :

1°/- Aller par monts et par vaux;

2°/- Ne faire que croitre et embellir.

(propono de S-ino Michaux)

mmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmm

## N I A   M E M B R A R O :

Membroj bonfarantoj : 2-/- S-ro SAHATDJIAN (Meuse)

Novaj membroj : 4- S-ro BENOIT (Gironde)
5- S-to RUNPAOT (Eure)

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$££££££££££££££££££££££££££££££££

## E N K E T O

Laù sugesto de nia membro S-ro Fayet (Puy-de-Dôme), ni petas niajn legantojn sendi al la redakcio la nomojn kaj adresojn de la katolikaj lernejoj en kiuj oni instruas Esperanton.
Se eble, bonvolu indiki la nomon de la kursgvidanto kaj la nombron de la gelernantoj.

Jam nun, pripensu la eblecon malfermi kurson en loka katolika lernejo en venonta septembro. Nur tion farante, ni pligrandigos la esperantan familion ... kaj la membraro de la Ligo. Antaùen, forte, kuraĝe kaj elegante !...

§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§

## I N F O R M O J

### INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Ĵus aperis provnumero, kun tre interesaj artikoloj plaĉe prezentitaj.

U.F.E. peras la abonojn : 10 Fr- al ĝia p.ĉ.K. Paris 855-35-

Abonigu viajn amikojn el Orienta Eùropo.

La revuo aperos en januaro, majo, septembro, BALARUC-les-BAINS (Hérault).

De la 1-a ĝis la 10-a de julio <u>ĉiujare</u> vi povos tie ripozi en Esperantujo.

Informojn donas S-ro Lentaigne, 3, av. de la Gaillarde, 34- MONTPELLIER, Francujo, kontraù respondkupono.

*************************************************************************

## V A R B A N T E   S A M I D E A N O J N.

Varbu ... varbu ... varbu samideanojn.

Tio estas la alarmkrio de la esperantistaj asocioj.
Ĉu tio signifas, ke nia afero estas nepre mortonta, se ne okazos miraklo ?

.../...

.../...

Tute ne; kaj mi kredas, ke neniu esperantisto iam miraklis. Ni semu la grenon; eble aliaj semideanoj rikoltos, kaj ni nenion ekscios pri la rezulto de nia propagando.

Ni povas konvinki amikojn pri nia afero.

Se esperantisto varbas unu samideanon pli junan, li varbas posteulon.

Se cent maljunaj esperantistoj varbas ducent junajn samideanojn (xxxxxxxxxxxxx), ili varbas cent posteulojn kaj dum la sekvonta generacio estos ducent esperantistoj en la grupo, kiu enhavis cent samideanojn. Tiel la esperantistaro estos duobliĝinta dum la tempo de unu generacio,

"kaj rapide kreskas la afero
per laboro de la esperantoj."

Jean-Marie GUILLON

mmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmm

## - KOTIZTABELO 1970 -

| | |
|---|---|
| IKUE kun "Espero Katolika" .................. | 17 Fr |
| IKI kun "Vojo, Vero, Vivo" .................. | 5 Fr |

Via peranto : G. Véron, p.ĉ.k.- Rouen - 11.88 63 Z-

| | |
|---|---|
| LFCE kun "Franca Katolika Esperantisto" ...... | 4 Fr |
| infano malpli ol 16-jara ............ | 2 Fr |
| membro bonfaranto ............................ | 20 Fr |
| dumviva membro ................................ | 80 Fr |
| UFE kun "Revue Française d'Espéranto" ........ | 30 Fr |
| UEA kun "Esperanto" kaj "Jarlibro" ........... | 46 Fr |

Ligue Française Espérantiste Catholique, p.ĉ.k.-Rouen-23 24 93 K-

££££££££££££££££££££££££££££££££$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

dépôt légal : 3° trimestre 1970 /// Polycopié par : F.M.C.
Papier de Presse : N° 34.745- /// Prieuré St-Martin
Directeur-Gérant : Gaston VERON /// LA HOUSSAYE
/// 77- TOURNAN-en-BRIE
FRANCE

*****************************************************************